## Redakta noto

Sur la interna flanko de la kovrilpaĝa folio prezentas sin la novaj estraranoj kaj komitatanoj por la 3-jara estrarperiodo 2003, 2004 kaj 2005. La elekto – kaj ankaŭ la aparta elekto de la prezidanto – senprobleme kaj rapide efektiviĝis. La laŭstatute (§ 6.2) alskribitaj estrar- kaj komitat-membroj respondis a) okaze de laborpretaj personoj per skriba preteco esti reelektataj (sed ĉiam kun la rimarko "sed ne kiel prezidanto", kaj b) okaze por denova kandidatiĝo ne respondis kelkaj personoj, de kiuj ankaŭ jam delonge ne plu okazis pagado de la ISAE-membrokotizoj.

Pro tio ni bedaŭre perdas el la gvidaj funkcioj junan kaj lertan komputiliston (de kiu mi estus dezirinta instalaĵon de "ISAE-hejmpaĝo") kaj la delegiton de granda landa filio. Sed fidelaj aliuloj restis, kaj la prezidanto estis – vole aŭ nevole – reelektita pro la forta rezigno de ĉiuj aliaj estraranoj por tiu ĉi posteno.

Mi dankas pro la konfido, ke mi denove povas servi al ISAE kiel prezidanto por la venonta 3-jarperiodo. Sed mi jam nun devas alvoke peti ĉiujn bonvolajn ISAE-membrojn, nepre zorgi en la propra regiono, en interesata rondo k.t.p. (kune kun la nova komitato), ke por la venonta elektoperiodo ekde 2006 estu trovata pli juna, pli kapabla, pli aktiva, pli "moderna" grupo de posteuloj por gvidaj funkcioj kadre de nia Asocio.

Ni do nuntempe havas 3 estraranojn kaj 3 komitatanojn; la prezidanteco restas ĉe mi, la vicprezidanteco ĉe kolego *Haszpra*; ankaŭ la 2 kasrevizoroj (nekomitatanaj) restas la samaj. Laŭstatute eblas alelekti pliajn 5 komitatanojn. Koncerna propondemando dum la elektoproceduro ne sukcesis. Tial mi petas nun interesitajn ISAE-membrojn mem anonci sin, se ili iom pli aktive deziras partopreni en la vivon kaj prosperon de ISAE. Ŝanĝo okazis rilate al la grava posteno "Komitatano A ĉe UEA", pri kiu d-rino *Korĵenevskaja-Gouriou* rezignis (tamen fidele restos komitatanino) – sed tuj pretis akcepti tiun postenon d-rino *Lewanderska-Quednau*. Mi dankas ilin, same kiel mi dankas kaj bonvenigas 3 novajn Landajn Delegitojn (por Bosnio, Ĉilio kaj Japanio) kiuj pretas reprezenti nian Asocion en siaj hejmlandoj. Mi atendas pliajn fidelulojn, kiuj anoncas sin, fariĝi ISAE-delegito en lando, en kiu ili volas varbi por nia Asocio.

Kaj nun – ĝuu la legadon de la diversspecaj originalaj artikoloj kaj la terminologiaj, scienceĥaj kaj legantleteraj kontribuoj de tiu ĉi kajero, en kies finaj 4 paĝoj troviĝas kompleta listo de la titoloj de en la lastaj 12 SR-kajeroj publikigitaj "sciencaj eĥoj" kaj aliaj sciigoj. Kaj kial ne uzi la novan rubrikon "*Kion cetere opinias la ISAE-anoj?*" por viaj iom "eksterssciencaj opinioj" (primovadaj, asocistrategiaj, etikaj ktp.) por vigligi la enhavon de nia Scienca Revuo?

Salutas vin *Prof. Dr. R. Sachs*, antaŭa kaj denova ISAE-prezidanto



## Originalaj artikoloj

# Nomoj de plantoj kaj bestoj en Esperanto

## La konceptoj de *Wüster* kompare kun tiuj de aliaj terminologoj*

*W. M. A. De Smet*

### Enkonduko

Kiam la aŭstro *Eugen Wüster* (1898-1974) komencis la redaktan laboron de sia fama "Enciklopedia Vortaro Esperanto-Germana" (ĉirkaŭ la jaro 1920), li certe tuj konfuziĝis per la jam granda nombro de nomoj de plantoj kaj bestoj en tiu relative nova lingvo. La temo interesis lin, kaj li tial pli profunde esploris ĝin, konsultante du biologojn, nome d-ron *Jentsch* kaj speciale d-ron *W. Döhler*. El lia korespondado kun tiuj du personoj rezultis lia kompreno pri la komplikiteco de tiu nomaro. Sekve de tio, li dediĉis al tiu temo 7 paĝojn (pp. 60-66) de la Enkonduka parto (parto aperinta en 1923) en la ĉapitro "Esperantologiaj Principoj".

Antaŭ kaj post *Wüster* pluraj aliaj personoj estas spertintaj similajn konstatojn, kaj multaj inter ili estas reagintaj al la faktoj per sia propra maniero, tiel kreante interesan, sed ankaŭ malbenindan, faskon de ideoj, kiuj kondukis al diferencaj formoj de kreado de nomoj sur tiu kampo. Tiukampe multe dependas, ĉu tiuj nomkreantoj estis jes aŭ ne fascinitaj de la scienca nomenklaturo kaj ĉu ili jes aŭ ne kapablis distingi inter la normalaj latinaj nomoj kaj la nomoj de tiu nomenklaturo.

Nun, en periodo, kiam pluraj korifeoj de tiu nomformado estas forpasintaj, valoras iom retrorigardi al la jarcenta rezulto de tiu interesa fenomeno, kaj esplori, kiel tiu nomfarado prefere evoluu en la sekvonta jarcento.

### La estiĝo de la unuaj nomoj de bestoj kaj plantoj en Esperanto

La unuaj esperantlingvaj nomoj de bestoj kaj plantoj estas faritaj de la elpensinto mem de la lingvo Esperanto, d-ro *L.L. Zamenhof* (1859-1917). Profesie kuracisto, li certe iam dum siaj universitataj studoj

* Kontribuo al la *Wüster*-simpozio, Vieno, aŭgusto 1998